



Kajeroj el la Sudo




ISSN 1886-1997

La 30^a jaro

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k106/k106.html>



Sub la stelo de la Finna Kongreso

N^o 106^a

Julio 2019

Kajeroj

Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj
(HALE).

el la Sudo
Calle Jabonerías, 6.3° D
30010 Murcia
Hispanio

Enhavo

Redaktore: Sub la stelo de la FK..3
Recenzo: Klasikuloj ankaŭ pekas..5
Politiko: Ĉu Hispanio estas ruĝa?. 8
Tiuj niaj: Salvador Bacarisse.....10
Movado: Itinera ekspozicio.....12
La peko de l' Taliban': ĉ. 13..... 14
La Faraono, ĉ. 54.....17

ISSN 1886-1938 (printita)
Prezidas: Johano A. Cabezos.
Redaktas: Jesuo de las Heras.
Korektas: Jozefo Pina.
Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Oni povas reprodukti la enhavon,
kondiĉe, ke oni citu la originon.

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj,
kvankam ni klopodos publikigi ĉiun
artikolon, kiun ni trovos interesa kaj kies
enhavo mistraktas neniun personon.

Pri la enhavo de la artikoloj
respondecas ties aŭtoroj, ne la
redakcio.

Kovrilo: De la 7^a ĝis la 20^a de junio okazas ekspozicio itineranta de
Esperanto en Muĉamjel', Alikanto. Samideanoj estas bonvenigitaj
vidi ĝin.

Ankaŭ ni parolas pri la proksima UK en Finnlando.

Nesubskribitajn
artikolojn verkis
la redaktoro.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €5
jare por ricevi la surpaperan version de
nia magazino.

Konto **ES30 2100 4617 4122 0011 5275.**

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Poste, sendu noton al
kajeroj@gmail.com

Notu, ke malfrua kotizo povas signifi perdi numeron.

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de
donaco al la menciita konto, se oni deziras helpi
kaj tamen ne ricevi la surpaperan version.

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:
OpenOffice Writer, Gimp, Scribus, gFtp kaj Bluefish.



Sub la stelo de la Finna Kongreso



Kiel ĉiun jaron, baldaŭ komencos La UK 104^ala Universala Kongreso de Esperanto. Eble vi legos tiun ĉi artikolon en ĝi mem, eble ni renkontos, ĉar eble mi vizitos ĝin, ankaŭ. Sed se ne, sciu, ke mi estos tie spirite. Ĝi okazos en la urbo Lahtio, Finnlando, de la 20^a ĝis la 27^a de julio, kaj oni jam povas scii pri ĝi de majo de 2019.

Kial oni devas ĉeesti kongresojn de Esperanto? Nu, vere, oni ne devas, tamen estas konsilinde iri fojfoje vidi, ke aliaj homoj en disaj partoj el la mondo ankaŭ partoprenas la meman emon al aliaj kulturoj, individuoj kaj pensmanieroj. Ĉefe, se oni komencas paroli nian lingvon. Sed oni nepre ankaŭ ne estu bigota pri tio, ĉar absoluta vero, se ekzistas, oni tre malprobable trovos ĝin tie. En Universalaj Kongresoj oni verŝajne trovos, ke ekskursoj estas tre multekostaj, sed konsilindaj; fakte estas tuta tago, je la mezo de la kongreso, por ke ĉiuj, kiuj tion deziras, partoprenos. Nu, se oni sufiĉe frue mendas ĝin, ĉar ne malofte mi troviĝis inter tiuj, kiuj ne povis partopreni pro tio, ke mi pripensis la aferon tiom longe, ke ne plu estas loko kiam mi

decidis pagi kaj partopreni. Sed ne gravas. Mi ĉiam memoros, ke dum la Kongreso de Montpellier, je 1998, mi ĝuis la urbon kongresan kune kun mia amiko Martín Bustín Benito, kaj ni kune malkovris belan urbon, kaj la absolutan veron, ke estas stultaĵo perdi la konon pri la kongresa urbo pro ekskurso aliloke.

Jes, estas ankaŭ tiuj homoj, kiuj dediĉas pluan semajnon, eble kelkajn, vidi la urbon kongresan, aŭ plu vojaĝi kadre de la postkongresaj aktivajoj. Tiuj ĉijaraj estas kvin taga ekskurso al urboj Turku, Raŭmo kaj Aurajoki, en la okcidenta parto de Finnlando, kontraŭ €1165; aŭ oni povas iri ankaŭ tiujn tagojn (de la 27^a ĝis la 31^a) al norda parto, vizitante la ĉefurbon de Laponio, Rovaniemi, la nordpolusan cirkon, Posio, Taivalkoski kaj Oulu, kontraŭ nur €1090. Sed se vi preferas viziti antaŭ la kongreso mem, por interkonatiĝi kun la lando antaŭ ĝi la esperantan festumon internacian, vi povas

ekskursumi de la 12^a ĝis la 14^a de julio al Peterburgo per krozŝipo Anastasia, kontraŭ €295 ĝis €665, laŭ la kavlito de la kajuto kaj nombro da litoj, sed antaŭe, se vi emas, vi povos interkonatiĝi de la 16^a ĝis la 20^a kun Helsinko, la baltmara perlo, kaj Espoo, Porvoo, kaj finfine atingi Lahtio, kie la kongreso okazos, kontraŭ nur €1070. Oni povus trovi tiujn prezojn altekostaj, sed se oni havas monon kongresumi en Finnlando, oni certe povos elspezi iom da eŭroj plilongigi la esperantan sperton. Tamen ne troigu en via ideologiismo pri esperantistoj, ĉar ni estas same eraremaj kiel neesperantistoj. Nia komuna celo estas nia emo paroli al aliaj homoj, eble el diversaj landoj, sed ni povas trovi ankaŭ —fakte certe trovos— homojn, kiujn vi ne gastintus ĉe vi: kverelemajn, egoismajn, profitemajn aŭ avantaĝemajn, trompemajn, kaj tiel plu, krom la malajn, kompreneble. Kelkaj el

ili ĉiam kongresumas, do estas malnova amikeco inter ili. Ili certe bonvenigas novkongresanojn, certe, kaj kelkaj el ili iĝos en la alian grupon, eternajn kongresanojn...

Sed se oni ne povas spertumi la kongresan travivaĵon, oni ne estos malpli bona esperantisto pro tio, ĉar estas evidente, ke esperantistoj neniam estis riĉaj. Oni povas skribi, retumi kaj telefoni esperantistojn ĉiun tagon, kaj konservi sian uzon de la lingvon korekta, klara kaj eleganta, kiel profesoro Andreo Cseh diris al ni pere de sia metodo instrui Esperanton. Kaj ni certe trovos novaĵojn kaj rezultojn de la kongreso en diversaj magazinoj esperantaj, en ĉi tiu inter ili.

Do, trafoliumu niajn paĝojn ĉu vi kongresumas, ĉu vi restis hejme, ĉu vi estis aliloke dum la UK 104^a, kaj sendu al ni viajn komentojn aŭ kritikojn, eĉ eseojn viajn pri la UK aŭ aliaj aferoj. Ĉiukaze, bonan legadon!

Daŭrigas el paĝo 7^a

konsterno scii pri la egoismo kaj nedankemo de **Debussy**, sed multe pli pri la trista sorto de **Tchaikovski**, unu el miaj plej ŝatataj komponistoj, ĉar vere tiu lia ne estas peko, aŭ almenaŭ ne plu estas en nia aktuala socio, kvankam en tiutempa Rusio ĝi ja estis: li estis samseksemulo, kaj tiutempe tio estis mortpunata peko. Nur tiumaniere oni povas kredi, ke li mortis kiam li aĝis nur 53 jare, onidire ke pro ĥolero ĉar li drinkis akvon rekte el la krano, sed sub tiu ago kuŝas, nun oni asertas, mortkondamno de registaro cara, ĉar estis notita sia kondiĉo, kaj oni donis al li la eblecon elekti ĉu morti publike ĉu kaŝe, kvazaŭ pro subita malsano, sed vere pro dozo da venomo. Sed per sia muziko li atingis, ke ne nur viroj, sed virinoj amas lin hodiaŭ.

¹ Se kopii la kodon estas neebla, oni povas premi sur la ligon en nia reta versio: <https://open.spotify.com/user/wsyfwc3ww46pqqzwyiks7gthh/playlist/5WzZBX6OcBSM7H0v0xBpXa?si=2CiSEytQHyRmiBL7YJXNQ>

Recenzo

Klasikuloj ankaŭ pekis!

Vole-nevole oni vivas en mondo santktigema: ĉiu pasintulo, kiuj sukcesis, estas sanktulo, kun moralo neatakebla, ĉar li aŭ



Fernando Argenta.

ŝi (preskaŭ ĉiam temis pri li, ĉar ne vane temas pri pasinto) jam estis suprenaltarigita:

Beethoveno, Cezaro, Kolombo, Fleming', S-ino Curie, Napoleon', Fidas', kaj tiel longa plu.

Eble oni koleros, se oni memorigos al ili pri tio, ke **Cezaro** estis genocida, aŭ **Beethoveno** estis **putinema**, aŭ plej sanktigita opero, **Magia Fluto**, estis konceptita en ludejo dum ties kreinto ludas biliardon...

Koleron oni estu libere senti, sed historio pruvas, ke genioj ne estis pli bonaj aŭ bonkonduktaj ol ni, eĉ se ili faris malsame kiel ni en sia metio. Estas logike koncepti, ke neelstarulo (aŭ mediokrulo, se oni volas) emas konsideri geniulojn (aŭ starulojn, se tiel oni deziras kredi) frenezaj. Jen, laŭ mi, pruvo pri mediokreco (aŭ neelstareco, se oni emas pensi, kvankam mi persone preferas la neologismon **kretineco**)

ĉe tiuj konsiderantoj. Ĉar novaj bonaj aferoj venas el novaj manieroj fari aferojn, aŭ almenaŭ pliperfektigitaj, kiel Ludoviko Beethoveno diris al sia majstro, Jozefo Haydn: *Ĉu kial mi volas lerni la regulojn, se mi ne ŝatas ilin? Lerni kiel rompi ilin pli bone!*

Ne, ne pri politikoj mi parolos nun, nek politikistoj, aŭ militistoj, eĉ skulpturistoj aŭ eĉ pentristoj, sed pri muzikistoj.

Mi ĵus legis mirindan libron verkitan de Fernando Argenta, fama muzikologiisto kaj radiofonia programisto kaj prezentisto, titolita **Klasikuloj ankaŭ pekis**, per kiu mi lernis, ke miaj muzikaj herooj estis, feliĉe por ili pli ol por mi, normale homaj. Ili ne nur havis brilan flankon, sed ankaŭ grizan, kaj el konflikto inter ili, aŭ eble malgraŭ ili, belajn produktojn ili lasis al ni, kiel la **Pate-tisma sonato** de Ludoviko Beethoveno, aŭ tiun mirindan **Nefinita simfonio** de pli juna **Franz Ŝubert'**. Jes, se la majstro de Bonn mortis kiam li estis 57 jaraĝa, la viena komponisto Ŝubert' lasis nian planedon kiam li estis nur 31^a. La unua estis memvenomigita de plumbo en malmultekosta fiŝo, kiun li vere amis manĝi, sed tamen lia **avareco** devigis lin aĉeti je la malplej kosta kvalito, kiun li trovis en merkato. Li ankaŭ ŝatis viziti putinejojn, sed ne luksaj pro la sama kialo. Do, la homo,

kiu diece altigas siajn korojn kaj animojn per siaj **Kvina simfonio**, **Missa Solemnis**, sia **Koncerto Imperiestra**, ne paroli pri sia novigema kaj rompigema **Sesa** kaj neniam antaŭe vidite (pro inkluzivigo de horo en sia) **Naŭa simfonioj** estis **avaro** kiu seksumis kun malmultekostaj putinoj. **Franz Ŝubert'** ne estis tiom avara, sed tamen li ja estis malriĉa komponisto kies **malalta memestimo** emigis lin seksumi kun putinoj, kiuj infektis lin per **sifiliso**, kiu mortigis lin je la momento, kiam lia muzika produktado estas en sia plej alta punkto. Eble se li vivintus dudek

jarojn pli ni povus havi nun duan Beethovenon, aŭ eble tiu ĉi nun estus nur dua Ŝuberto...

Aliaj komponistoj estis pli prudentaj, kiel ekzemple itala **Antonio Vivaldi**, kiu kunvivis kun deca kaj religiema bela kantistino Anna Ĝiró'..., kaj ŝia fratino Paolina. La problemo estas, ke la kreinto de **La kvar sezonoj** kaj multaj aliaj verkoj, ĉirkaŭ ok centoj, estis pastro. Fakte oni nomis lin *Il prete*

rosso, la pastro ruĝa, samtempe pro tio, ke li estis tiom fajra kun virinoj, kiel kun muzikoproduktado. Ĉu liaj koncertoj por violino (sia preferata muzikilo) aŭ orĥestro estas malpli belaj pro tio, ke ilia kreinto vivis en peko?

Ankaŭ en peko vivis itala mondkonata muzikisto **Ĝusepe Verdi**, kiu diris eĉ al sia amata bopatro, ke post la morto de ties filino li vivis en peko kun kantistino dum dekoj da jaroj, ĉar tio



estis nenies afero, sed sole lia kaj de tiu kantistino. Hungara mondfama **Franz Liszt** ankaŭ estis pastro, kaj tamen havis gefilojn kun Grafino D'Agoult, kvankam ne pro tio li neglektis seksumi kun aliaj virinoj, sed vere nur nobelulaj, ĉar li estis fierŝvela krom seksema. Unu liaj filinoj edziniĝis al fama **Rikardo Wagner'**, kreinto de la plej longa opero, kiun mi konas, **La oro de la Rejno**, kiun Hitlero profitis propagande favore al supereco de germana raso. Tiu Richard Wagner, germane, havis unuan edzinon antaŭ Kosima Liszt-n, kiu multe suferis pro li, ĉar li ne volis labori krom en sia muziko, kaj pensis, *ke la mondo devas subteni lin, ĉar li donas plezuron al la mondo!* Eble pro tio ankaŭ li preferis kuŝi kun edzinoj de siaj amikoj..., kiel Kosima Liszt, kiu dekomence estis edzino de Hans von Bülow, amiko de la komponisto kaj bofilo tiama de Franz Liszt.

Estis rivaleco en ties tagoj inter Richard Wagner kaj **Johano Brahms'**, sed vere inter iliaj diversaj fanatikularoj, ĉar la unua estis progresisma kaj la dua multe pli tradicia pri sia muzikarto. Ni lasu al persona gusto decidi kies muziko estas pli altkvalita, eĉ se veras ke oni ne devas elekti, ĉar ambaŭ muzikoj estas indaj, se oni ŝatas bonan, altkvalitan sonarton. Revenante en nian temon, diras Fernando Argenta, ke Brahms ankaŭ ŝatis ĉasi virinojn, ĉiam altkvalitajn,

kompreneble, sed kiam ili finfine falis konkeritaj, li forlasis ilin, kaj ili finfine edziniĝis al aliaj viroj. Eble pro tio, ke *liaj unuaj spertoj pri virinoj estis en putinejo, kiam li estis nur 14 jaraĝa*. Fakte la dumviva amspasio de Brahms' estis **Klara Wiek**, la edzino de sia protektanto kaj amiko, **Roberto Schumann**. La problemo estis, ke li aĝis 14 jarojn malpli ol ŝi, kaj 14 jarojn pli ol ŝia filino, kaj pro tiu malbona ŝanco elekti, li mortis fraŭlo, eble pro iom da aldona mizogineco krom tiu adoro al fajna pianistino Klara Ŝuman.


La libron de Fernando Argenta oni povus rigardi kiel libro pri klaĉado pri diversaj geniuloj de muziko, kaj eble pro tio ĝi estis *Best Seller* (plej vaste vendita) je 2010, kiam ĝi estis publikigita, sed mi ĝin legi konsilas al muzikamanto, ĉar la komentoj de S-ro Argenta restas amuzaj kaj interesaj, kaj lia plumo trafas la kernon de la problemo **peka** de ĉiu komponisto pritraktita: Vivaldi, Bach, Haydn, Mozart, Tchaikovski, Puccini kaj Debussy krom tiuj menciitaj supre. La libro inkluzivas indikojn pri plej populara muziko de tiuj geniuloj, kiujn mi kompilis per tiu ĉi listo de Spotify por aŭskulti la rekomenditan muzikon de Fernando Argenta dum mi legis (vidu fino de paĝo 4^a).

Pri la du lastaj menciitaj komponistoj, mi devas konstati mia

Daŭrigas en paĝo 4^a

Politiko **Ĉu Hispanio estas ruĝa?**

De multe da tempo mi miras, ke se oni parolas al simpla civitano en mia etoso, oni aŭdas sloganojn de maldekstro dise, kiu temas ĉefe pri memoro historia kaj politika korekteco. Oni malaprobos, ke kelkaj defendas la rajton memdefendon en sia hejmo, ĉar oni devas havi valorojn homamajn, kiu defendas, ke vivo homa valoras pli ol propraĵo, eĉ se inter tiuj propraĵoj estas via mema vivo... Pro tiuj sloganoj tiom vaste akceptitaj sen antaŭa pripenso, oni povas kompreni, ke Pedro Sánchez povis venki la lastan balotadon, eĉ se ĝi, lia plej bona, donis al li tiom da deputitoj, kiel la plej malbona de Mariano Rajoy, kiu ankaŭ ne povas fieri esti lerta politikisto...



Tamen, mia demando restas valida, kaj plaĉus al mi, ke samideano respondos, se li aŭ ŝi povas kaj emas: Ĉu Hispanio estas ruĝa? Dum nia bedaŭrinda Intercivitana Milito, evidentiĝis, ke tiam ĝi ne estis. Ni diru, ke estis kaj kaj, ke estis duono ruĝa, kaj duono malruĝa (mi ne kuraĝas diri, ke la neruĝa duono estis faŝisma, eĉ dekstra pro respekto al vero), sed ili ariĝis malantaŭ la armeo kontraŭ la ruĝaro, kiu volis senhavigi la popolon favore al komunisma kredo, kiu tiam triumfis en Sovetunio, kaj pretis disvastiĝi en la mondon. Poste venis kvar dek jaroj, dum kiuj neniu volis malferme aktivi politike, nur tre malgranda minoritato, kiu kaŝis aŭ enmigris en aliajn landojn, kiel Francio kaj Meksikio, kiuj estis la plej grandaj ricevantoj de niaj elmigrintoj. Poste oni sciis, ke tiuj landoj ne estis tiom sindonaj al niaj samlandanoj, sed mi parolos pri tio je alia momento...

Post tiu bedaŭrinda diktatoreco, venis **aldona periodo**, kiun oni bombaste preparolas kiel **Demokration**, eble pro tio, ke oni ne volas lerni tion, kio demokratio estas. Dum tiuj jaroj oni aĉetis falsajn sloganojn, kiel ekzemple, ke komunistoj estas demokratoj, aŭ ke nia Leĝo da leĝoj estas konstitucio, kaj ke konstitucion oni ne povas ŝanĝi aŭ anstataŭi de alia, vera konstitucio kaj vere demokratia. Homoj stratpiede ankoraŭ ne parolas pri politiko, sed

pri partioj politikaj per simila maniero al tio, kion ili diskutas pri futbalo: *mi defendas tiun mian, eĉ se ĝi malvenkas!* Sed ĉiel ajn, la memdiritaj ruĝaj partioj, nome PSOE kaj PODEMOS, fakte ne venkis kun absoluta plimulto, eĉ ne sufiĉe signifa por formi registaron sen la helpo de partioj sendependismaj, kiuj en civilizaj landoj estas malpermesitaj kaj ĵure persekutataj pro tio, ke ili perfidas la nacion. Sed ruĝuloj ne abomenas tion, kaj pro tio la kontraŭ ruĝa movado kreskas kaj kreskas ĉe ni, mi kredas. Oni ne plu kredas la mensogojn, kiujn demagogoj propagandas: ekzemple, pro tio, ke la minimuma salajro kreskis ĝis €900, multaj familioj ne plu povas dungi servistinojn, kaj pro tio maldungeco kreskis en la lando. Kompreneble, estas bone, ke oni havas bonan salajron, sed unue la registaro devus krei la kondiĉojn, por ke oni povos dungi la laboristojn, ke oni bezonas. Sed se oni devigas troajn impoŝtojn al dunganto, la dunganto ne dungas.

Se oni analizas la mapon, kiun mi metis supren, oni vidos, ke ne ruĝa estas. Inter la urbestrejoj gajnitaj de tiel memnomumitaj ruĝajn partioj, kiuj en la mapo koloras ruĝe, estas alipartiaj, kiuj koloras blueske. Se Hispanio estus ruĝa, la koloro de la mapo estus ruĝa, klare ruĝa. Sed tio ne okazas. Eble

post la paktoj partiaj de tiuj ĉi tagoj, la mapo ruĝiĝos iomete, se mi kredas, ke ne multe pli. Aŭ eble ĝi bluiĝos. CIUDADANOS povus pakti kun iu ajn, sed ni atestas, ke Alberto Rivera ĵuris dumkampanje, ke li ne paktos kun PSOE de Pedro Sánchez. Eble la situacio disvolviĝis en estaton, kiun li ne plu povos kontroli. Se li volas povon, li devos konsenti kun aferoj, kiujn li ne devos, inter ili pakti kun PSOE. Ĉu li demisios pro tio? Mi dubas: en Hispanio neniu demisias. Eĉ Manuel Valls, kiu nun volas donaci siajn voĉojn al Ada Kolaŭ ŝanĝe de nenio, por ke ŝi daŭre estos urbestro de Barcelono. Oni povas trovi, ke tio estas perfido al siaj voĉdonantoj, kaj al sia partio kaj ideologio. Sed ne gravas: partioj ne havas solidan ideologion, krom atingi povon kaj konservi ĝin tiom longe, kiom oni povas.

Eble post miaj argumentoj, la leganto ne vidas klaran respondon al mia demando, Ĉu Hispanio estas ruĝa? Mi devas konfesi, ke ankaŭ mi ne havas respondon. Espereble leganto havos kialojn diskuti pri tio, kaj konsideros utila sendi siajn konkludojn al mi, por publikigo en ***Kajeroj el la Sudo*** n-ro 107^a.



Tiuj niaj

Salvador Bacarisse

Ekzistas multaj elstaraj hispanoj, kiuj kaŝas forgesitaj en la ŝrankoj de historio. Bedaŭrinde tiu distrumetata **Leĝo pri Memoro Historia** okupiĝas nur pri mortintaj restaĵoj fizikaj, sed ne



pri la heredaĵo, kiun ili lasis al ni, kaj ni lasas perdi pro tio, ke ni estas ignorantaj pri niaj trezoroj kultura, kaj, ĉikaze, muzika.

Inter tiuj forgesitoj kaŝas elstara muzikisto, Bacarisse, kiun gitaristoj kutime konas nur pro sia dolĉa **Concertino por gitaro en La minora, verko 72^a**, popularigita de ludisto Narciso Yepes antaŭ kvar jardekoj. Sed li komponis multajn verkojn pli, multaj el kiuj meritoplene membras en muzika trezoro de homaro, ekzemple liaj operoj elstarajj **Ĉarlot** kaj **La trezoro de Boabdil'**, kompo-

nitaj je 1933 kaj 1958 respektive.

Sed kiel eblas, ke tiu grava komponisto estas senrimarkata en nia kulturo hodiaŭ? Evidente, pro politikaj kialoj. Mi ne komprenas, ke maldekstruloj reivindikas literaturistojn Federico García Lorca kaj Miguel Hernández, sed ne Salvadoron Bacarisse..., sed estas grava diferenco: Federiko estis mortpafita de *faŝistoj* dum nia Intercivitana Milito, kaj Miĥaelo mortis en malliberejo post tiu milito, kulpe de faŝistoj, ankaŭ, sed Salvadoro mortis siahejme en Francio je 1963... Do, li ne estas viktimo, kiun maldekstro povas priplendi kontraŭ faŝisma dekstro (fakte ili ne agnoskas nefaŝisma dekstro, interkrampe). Do, pro politikaj kialoj, oni forgesas pri muzika kaj kultura trezoro. Merda politiko!

Sed fakte, Salvador Bacarisse estis membro de la Komunisma Partio de Hispanio, male al la du menciitaj verkistoj, kaj havis oficon en la Dua Respubliko Hispana, male al ili du menciitaj beletristoj, ankaŭ. Jen maldankemo de kontraŭfaŝistoj, mi trovas. Kiam la senkuraĝa registaro de la respubliko fuĝis al Valensjo, li

sekvis ilin kaj iĝis Delegito de la Registaro pri Muzikaj Aferoj, kaj sekve li organizis koncertojn kaj operojn en tiu urbo. Li ankaŭ estis ano de la Alianco de Intelektuloj Kontraŭfaŝismaj por Defendo de Kulturo kune kun aliaj elstaraj eminentuloj, kiel María Zambrano, Rafael Alberti, Miguel Hernández, José Bergamín, María Teresa León, Rosa Chacel, Luis Buñuel, Luis Cernuda, Pedro Garfias, Juan Chabás, Rodolfo Halffter, Antonio Rodríguez Moñino, Ramón J. Sender, Emilio Prados, Manuel Altolaguirre, Max Aub, José Peris Aragón, Eduardo Ugarte, Salvador Arias kaj Arturo Serrano Plaja, pri kiuj oni povas legi en la hispana en tiuj menciitaj ligoj. Li ankaŭ aliĝis al *Grupo de Oko*, starigita de ok muzikistoj kun la celo avangardi la hispanan muzikon, kiun ili taksis tro tradiciisma tiutempe.

Antaŭ la milito li jam laboris en Union Radio, kiun oni konsideras la praavo de nuna Cadena SER (hispana akronimo por Societo Hispana de Radiodissendo) kiel direktoro artisma por propagandi la muzikon tiutempan. Je 1939 li elmigris al Francio, kaj tie li laboris aktive por Radio Televido Franca (ORTF) de 1945, produktante programojn en la hispana lingvo por Sudameriko.

Salvador Bacarisse verkis muzikon abunde, kaj se oni deziras koni lian verkaron, oni povas konsulti lian katalogon, kies referencon ni provizas*. Liajn verkojn oni povas, aldone, aŭskulti ĉe Spotify kaj aliaj muzikeldonejoj (kaj fizikaj kaj virtualaj). Mi esperas, ke per tiu ĉi artikolo, mi helpis disvastigi la laboron de interesa hispano, unu el ni.



*<https://recursos.march.es/culturales/teatro/fjm/catalogos/pdf/1031418.pdf>

Movado *Itinera ekspozicio de Esperanto*

Hieraŭ mi vizitis Muĉamjelon, urbeto de Alikanto, kie mi vidis muran informadon pri Esperanto. Jozefo Miĥaelo Bernabeu' informis nin pri la evento, kaj mi iris kun du samideanoj vidi la ekspozicion kreitan de HEF.

Mi devas konfesi, ke mi esperis pli, sed ne estis flagoj, aŭ aliaj objektoj, kiujn oni kutime vidas en Kongreso de Esperanto. Tamen,

la informado estis tre interesa kaj grava. Tute verkita en la hispana lingvo, la ekspozicio donas ideon pri tio, kio Esperanto estas, kion oni povas fari lerni ĝin, kial oni devus fari tion, kaj kelkaj aliaj datumajojn pri Esperanto, ekzemple, la nombro da parolantoj, kaj aliaj koncernaj ideoj.

La ekspozicio jam estis en Alikanto kaj Elche, kaj eble okazos en Murcia en la proksima estonto, kaj eble en Lorca, ankaŭ. Tiucele ni parolis kun Jozefo Miĥaelo Bernabéu, la organizinto de tiu ĉi ekspozicio en urbo de Alikanto, Muchamiel.

EL ESPERANTO Y EL CINE

En el caso del cine la dispersión de los hablantes del idioma es un factor que dificulta tanto la distribución como la creación de obras cinematográficas dirigidas específicamente a sus hablantes, o que empleen el movimiento esperantista como protagonista de sus historias.

No obstante, es interesante conocer películas en las que este idioma ha sido empleado, o bien ha desempeñado algún papel más o menos destacado. En total se pueden distinguir tres casos distintos, que a veces se superponen:

Películas filmadas en esperanto: *Incubus* (de Leslie Stevens y protagonizada por William Shatner), *La patro* (cortometraje realizado por Imagu Filmo).

Películas que reflejan algún elemento propio del idioma o de la comunidad de sus hablantes: *El coche de pedales* (2003, dirigida por Ramón Barea y protagonizada por Alex Angulo), *La ciudad cremada* (dirigida por Antoni Ribas en 1976, sobre la Semana Trágica de Barcelona).

Películas en que se emplea el esperanto como efecto para representar escenarios extranjeros, exóticos o internacionales: *El gran dictador* (de Charles Chaplin), *Ginga tetsudō no yoru* (película de animación japonesa de 1985), *Idiot's delight* (protagonizado por Clark Gable y Norma Shearer), *Gattaca* (1997, de Andrew Niccol), *Captain Fantastic* (2016, con Viggo Mortensen), entre otras.

www.esperanto.es

EL COCHE DE PEDALES
Dirigida por Ramón Barea, protagonizada por Pablo Gómez, Alex Angulo, Rosana Pastor y ambientada en la España del año 1999. En su argumento tiene cabida el esperanto, pues varios de los personajes protagonistas lo hablan. La distribución de las copias correspondientes del guión ha corrido con el patrocinio de la Federación Española de Esperanto.

INCUBUS
Fue fundada integrando en esperanto para dar un efecto de misterio se trata de una especie de alga, biológica, acerca del dominio del mal sobre el bien. Dirigida por Leslie Stevens y protagonizada por William Shatner, el guión no cambia el idioma y la producción es esperanta, por lo que en realidad no es apreciada por los hablantes de esperanto. Sin embargo, se ha convertido en una película de culto debido a las circunstancias que rodearon su distribución: los originales de 1965 se quemaron y fueron muchos años en ser por disponibilidad. Recientemente se recuperó una copia de forma casual y ha sido posible distribuir de nuevo en video.

LA PATRO (El padre)
Realizada por Imagu Filmo, producción brasileña que hace cortometrajes en esperanto. Dirigida por Joe Bazilio y protagonizada por José García, Marlene Belo y Cleber Veloso. La patro es una adaptación de una obra de la literatura japonesa de 1906, cuyo autor es Kitamura Tokuji. La película dura 40 minutos y tiene subtítulos en 13 idiomas.

La murajn instru-tabulojn komponis oni en la Centra Oficejo de HEF, en Madrido, kaj nur povas plendi mi pri tio, ke oni ne uzis bone la nomon Esperanto..., kvankam oni ne povas postuli perfektecon, ĉu vere? Sed mi jam konstatis delonge, ke kelkaj samideanoj tiom multe soifas pri egaleco por Esperanto kun naciaj lingvoj, ke same kiel oni parolas pri la hispana, angla, kataluna... lingvoj, oni ankaŭ minuskligas la vorton en *esperanton*, sed se oni konscie farus, oni vere dirus *esperantan* lingvon. Sed Esperanto estas propra nomo, same kiel Ludoviko, Johanino aŭ Hispanio. Estas troigo uzi *Esperanta Movado*, ekzemple (krom je la vera



komenco de frazo), ĉar adjektivoj propraj ne ekzistas.

Tion dirite, mi kredas, ke ĝi estas oportuna kaj utila iniciato, kiun ĉiuj esperantistoj en Hispanio devus apogi kaj labori por montri ĝin en sia urbo. Tiel, eĉ se ne multaj homoj venas vidi ĝin, ĵurnaloj eĥos ĝin kun iom da bonŝanco, kaj oni parolos pri Esperanto. Hodiaŭ skribis al mi amikino, dirante, ke ŝi pensis pri mi ĉar venis en konversacion kun nevino la vorton *Esperanto*. Por mi estas motivo por fiero, ke oni asocia min al Esperanto, kaj ĉefe al ties generanta ideo.

En foto oni vidas la organizanton Bernabéu kaj prezidanto de HALE, Juan Antonio Cabezas Martínez.

Saluton, gratulon pri la ideo, kaj bonan estonton por Esperanto kaj vi!

La peko de l' taliban'

13 La solvo.

Abdul' Saleh' rakontis al sia patro tion, kion la familio de Hakim' Aboĉakra ĵus faris, kaj aldonis, ke ili estis atendataj por paroli pri la ebla ligo inter ambaŭ familioj. Unu ebleco estas, ke li forkaptus Benaziron, kaj la alia estas, ke oni anoncos la estontan geedziĝon fare de ambaŭ familioj.

Sed gepatroj ne plu opiniis, ke estas bona ideo, ĉefe Zulem':

«Ne volas mi, ke oni detruos du familiojn pro tio, ke ni faru aferojn malbone. Ni devas paroli nenion kun ili. Ni jam vizitis ilin, kaj ili ne volis geedziĝon».



«Panjo, mi bezonas ripari tion ĉi. Mi ne povas vivi kun tiu pezo sur mi-aj ŝultroj».

«Ĉu edziniĝi ŝian fratino revivigos Rejnon?»

«Ne. Sed mi sentas netolereblan

pezon. Benazir' fartigos min pli bone... Eĉ se ŝi aŭ ĝi povos ankaŭ mortigi min. Tiel mi ne sentus tiun ĉi malhonoran pezon sur min».

Zulem' ne esperis tiun respondon el sia filo.

«Abdul' Saleh', ŝi estis malpura. Eble vi ne devintus denonci ŝin, tio ne estis via afero, sed eble ili mem farus por kovri sian malhonton. Kiel diable tio rilatas al vi? Kial ajn vi zorgas pri tiu afero?»

Abdul' ne povis diri al ili kiom bona, senkulpa, adorinda Rejin' estis. Tial li diris:

«Mi havas honoran ŝuldon kun tiu familio. Homo, kiu ne pagas honorŝuldon ne estas homo. Pro tio homo sen honoro ne rajtas vivi».

«Ĉu **La Libro** diras tion?»

«Ne, panjo. Sed ne nur per **La Libro** homo devas vivi. Ni estas humanaj, kaj ni devas vivi ĉi tiun vivon pace kun Dio, sed ankaŭ kun nia konscienco. Kaj Dio diras al mi, en mia eno, ke mi devas batali por mia spirita paco. Dio ne oponas min ripari la fian agon, kiun mi faris».

«Bone, filo, mi konsentas. La oferojn de patrino por siaj gefiloj nur komprenas Dio..., aŭ alia patrino».

La venintan tagon la gepatroj de Abdul' Saleh' kaj tiuj de Benazir' denove kunvenis kaj ili interkonsentis, ke ili permesos al siaj gefiloj geedziĝi, ĉar se en hejmo, kien honto venis, neniu pli deziras veni, eble povas veni la viro, kiu estis la ilo de Dio kaj de tradicio por ripari parton de la misfortuno, kiun ĝi suferas.

Benazir' ne tute konsentis, sed Hakim' Aboĉakra kaj Ibrahim' Saleh' ordonis ŝin venigi sian jam fianĉon. Ili ambaŭ estis klarigitaj pri la kondiĉoj pri ilia rilato: li venos ĉiun tagon vidi ŝin, tuj post sia laborado, kaj parolos al fianĉino en ĉeesto de patrino, dum tuta jaro. Fine de tiu periodo ili ambaŭ iros al Asra, la ĉefurbo de la lando, de kie ili venos kun certigilo subskribita de la Imamo Ĝenerala por silenti murmuradon de urbanoj, kaj tiumaniere la honoro de la familio Aboĉakra estos riparita pere de la akuzinto de sia bofratino.

Dum tuta jaro Abdul' Saleh' fartis vere malbone. Ĉiun tagon li vizitis sian fianĉinon kun sia propra kopio de **La Libro Sankta de Ĉiuj Kredantoj**, kaj legis al ŝi unun aŭ kelkajn ĉapitrojn, kaj poste li komentis ilin al ŝi, kaj aŭdis ĉion, kion li deziris diri pri ili, kaj ankaŭ kion diris sia estonta bopatrino kaj estanta fratino, Sanj', kiu fojfoje akompanis lin, ĉar laŭ indiko de sia patro devos pretiĝi por edziniĝo, ĉar ŝi estas tri jaroj pli aĝa ol Benazir', kaj jam estas tempo por ke ŝi pensu pri edzo.

Sanj' kaj Benazir' ne povas legi **La Libron** pro tio, ke ili estas virinoj, sed ili ja povas esti instruataj pri ĝi de viro.

Abdul' Saleh' negocis fojfoje kune kun Aben' Abdala', la plej riĉa homo en la tuta urbo, kaj profitante sian konon pri la karaktero, ŝatoj kaj malŝatoj de la riĉulo, ili ambaŭ amikiĝis facile. Li fakte

estis la unua amiko, ĉar Aben' ne havis amikojn en la urbo, kaj li volonte ekhavis unun, finfine. Kaj sia patro, Ibrahim', aprobis tion, ke sia filo invitis manĝi sian amikon ofte, aŭ tio, ke Abdul' vizitas la hejmon de Aben'. Tiu ĉi miris al tio, ke lia amiko mildigis sian fervoron religian tiel ke nun la estinta fanatikulo iĝis kompatema kaj pia homo, kiu tiom libere parolas pri Dio, Paradizo kaj la plezuroj de Ĉi Tiu Mondo samtempe, kaj defendas pri la plej granda plezuro kiel paco kun sia konscienco, kun siaj genajbaroj, kaj kun la ceteraj urbanoj.

Post la interkonsentita jarperiodo, Abdul' Saleh' vojaĝis al ĉefurbo kune kun sia fianĉino, kaj kvin tagojn poste la Imamo Ĉefa de la lando, Kassim Ibn Ĉakur (Tiu agnoskata), post pristudi la dokumentojn, kiujn la gepatroj de ambaŭ homoj subskribis, geedzigis ilin en ĉeesto de du preterpasantaj atestantoj. Kun skribita certigilo en mano, ili vizitis la imamon de sia urbo kune kun siaj gepatroj. La loka imamo subskribis novan dokumenton, kiu pruvas, ke ili estas geedzoj laŭleĝe ĝis kiam venos repudio aŭ morto. Tiel, je la momento en kiu Benazir' songis, ke nekonatulo malpurigis ŝin, sia edzo prenis ŝin kiel unuan edzinon en pura kondiĉo, kiam ŝi komencas sian dekkvinan jaron en vivo.

Venas el paĝo 23^a

La monarĥo paliĝis kaj kunpremis la dentojn. La feniciano rimarkis tion kaj rapide aldonis:

—Fine, por kio mi konsumas la tempon de via sankteco per mia malsaĝa babilado?... Estas ĉi tie, en Memfiso, la princo Hiram... Li povas pli bone klarigi ĉion al mia sinjoro, ĉar li estas saĝulo kaj membro de la plej alta konsilantaro de niaj urboj...

Ramzes viviĝis.

—Donu ĉi tien plej rapide Hiramon —respondis li. —Ĉar vi, Dagon, parolas kun mi ne

kiel bankiero, sed kiel funebra ploristino.

La feniciano ankoraŭ unu fojon ekfrapis la plankon per la frunto kaj demandis:

—Ĉu la respektinda Hiram ne povus tuj veni ĉi tien?... Vere, estas jam malfrue... Sed li tiel timas la pastrojn, ke li preferus nokte prezenti sian respektigon al via sankteco...

La Faraono ekmordis la lipojn, sed konsentis. Li eĉ sendis kun la bankiero Tutmozison, por ke tiu konduku Hiramon en la palacon tra sekretaj eniroj.

La Faraono

Ĉapitro 55^a

Dum la sepdek tagoj, dum kiuj la respektindaj restaĵoj malsekiĝis en la soda akvo, Egipto portis funebrajn vestojn.

La temploj estis fermitaj, oni ne faris procesiojn. Eksilentis ĉiu muziko, oni ne aranĝis festenojn, la dancistinoj fariĝis ploristinoj, kaj anstataŭ danci, ŝiris siajn harojn, kio ankaŭ alportis al ili profiton.

Oni ne trinkis vinon, oni ne manĝis viandon. La plej grandaj altranguloj estis en dikaj vestoj, nudpiede. Neniu sin razis (ekster la pastroj), la plej fervoraj eĉ ne lavis sin, sed ili ŝmiris siajn vizaĝojn per koto, kaj ŝutis cindron sur la harojn.

De Mediteraneo ĝis la unua katarakto de Nilo, de la libia dezerto ĝis la duoninsulo Sinai, regis silento kaj malĝojo. Estingiĝis la lumo de Egipto, foriris al la okcidento kaj forlasis siajn servistojn la sinjoro, kiu donadis ĝojon kaj vivon.

En la alta societo plej modaj estis la interparoladoj pri la ĝenerala malĝojo, kiu ekregis eĉ la naturon.

—Ĉu vi ne rimarkis —parolis altrangulo al altrangulo —ke la tagoj estas pli mallongaj kaj pli mallumaj?

—Mi ne kuraĝis tion diri al vi —respondis la alia —sed efektive estas tiel. Mi eĉ rimarkis, ke malpli da steloj lumas nokte kaj ke la plena luno daŭras malpli longe, kaj ke la nova luno pli longe ol ordinare.

La paŝtistoj diras, ke la brutoj ne volas manĝi en la paŝtejoj, ili nur blekas...

—Mi aŭdis de la ĉasistoj, ke la plorantaj leonoj ne atakas plu la kapreolojn, ĉar ili ne manĝas viandon.

—Teruraj tempoj!... Venu al mi hodiaŭ vespere, kaj ni trinkos po glaso da funebra fluidaĵo, kiun elpensis mia kelisto.

—Mi scias, sendube vi havas la nigran sidonan bieron..?

—La dioj gardu nin trinki en la nuna tempo gajigajn trinkaĵojn! Tio, kion elpensis mia kelisto, ne estas biero... Pli ĝustadire mi komparus ĝin kun vino, saturita per muskato kaj bonodoraj herboj.

—Tre konvena trinkaĵo en la tempo, kiam nia sinjoro restas en la kvartalo de l' mortintoj, kiu ĉiam spiras la odoron de la muskato kaj bonodoraj herboj.

Tiel dum sepdek tagoj ĉagreniĝis la altranguloj.

Unua ekstremo de ĝojo trakuris Egipton en la momento, kiam el la kvartalo de l' mortintoj oni konigis, ke la korpon de l' sinjoro oni elprenis el la soda bano kaj ke la enbalzamigistoj kaj pastroj jam komencis la ceremoniojn.

En tiu tago oni unuafoje tondis la harojn, forigis la koton de la vizaĝoj, kaj tiuj, kiu sentis deziron, lavis sin. Efektive, ne ekzistis plu kaŭzo malĝoji: Horus trovis la restaĵojn de Oziriso; la estro de Egipto, dank' al la arto de l' enbalzamigistoj, retrovis la vivon, kaj dank' al la preĝoj de la pastroj kaj al "La libro de l' mortintoj" fariĝis egala al la dioj.

De tiu momento la mortinta Faraono Mer-amen-Ramzes estis oficiale nomata Oziriso; neoficiale oni nomis lin tiel tuj post la morto.

La gajeco de la egipta popolo komencis forigi la funebbron, precipe inter la soldatoj, metiistoj kaj vilaĝanoj. Inter la simpla popolo la ĝojo eksplodis iafoje en nekonvena formo.

Famoj komencis rondiri, oni ne scias de kie, ke la nova Faraono, kiun la popolo jam amis instinkte, volas plibonigi la sorton de la vilaĝanoj, laboristoj, eĉ sklavoj.

Kaj tial (kia skandalo!) okazis, ke la masonistoj, lignaĵistoj kaj potistoj, anstataŭ trinki trankvile kaj paroli pri familiaj aferoj, kuraĝis en la drinkejoj ne nur plendi pri la impostoj, sed eĉ indigni kontraŭ la povo de l' pastroj. La vilaĝanoj, anstataŭ preĝi dum libera tempo kaj honori la antaŭulojn, parolis unuj al aliaj: kiel bone estus, se ĉiu el ili posedus kelke da bedoj da tero kiel propraĵon kaj povus ripozi ĉiun sepan tagon!

Senutile estus paroli pri la soldatoj, precipe pri la fremdlandaj regimentoj. Ili imagis, ke ili estas la plej eminenta klaso de Egipto, aŭ se ili ne estas, ili baldaŭ estos, post sukcesa milito, kiu devos eksplodi.

Kontraŭe, la nomarĥoj, la nobeluloj, kaj precipe la ĉefpastroj solene portis la funebbron de la mortinta sinjoro, kvankam oni jam povis ĝoji, kiam la Faraono fariĝis Oziriso.

Ĝustadire la nova estro faris ankoraŭ malbonon al neniu, la kaŭzo do de la malĝojo de la altranguloj estis nur famoj, la samaj, kiuj ĝojigis la simplan popolon. La nomarĥoj kaj nobeluloj sentis agaĉon ĉe la penso, ke ilia kamparano povus resti senokupa kvindek tagojn en la jaro, kaj kio estas pli malbona, posedi kiel propraĵon teron, eĉ se ĝi sufiĉus nur por konstrui tombon. La

pastroj paliĝis, kaj kunpremris la dentojn, rigardante la administradon de Ramzes kaj la manieron, kiel li agis kun ili.

Efektive, en la palaco de la reĝo fariĝis grandaj ŝanĝoj.

La Faraono transportis sian loĝejon en flankan konstruaĵon, en kiu preskaŭ ĉiujn ĉambrojn okupis generaloj. En la subtera etaĝo li loĝigis grekajn soldatojn, supre gvardistojn, en la ĉambroj ĉe la muro etiopianoj. Ĉirkaŭ la palaco staris garde azianoj, kaj apud la ĉambroj de Lia sankteco la skadrono, kiu kun Ramzes persekutis Tehennan en la dezerto.

Pli malbone estis, ke Lia sankteco, malgraŭ la lasta ribelo de libianoj, redonis al ili sian favoron; punis neniun, kontraŭe, donacadis al ili sian konfidon.

Estas vere, ke la pastroj, kiuj estis en la ĉefa palaco, restis tie kaj plenumis la religiajn ceremoniojn, direktataj de Sem. Sed ĉar la pastroj ne akompanis la Faraonon ĉe la matena, taga kaj vespera manĝoj, ilia nutraĵo fariĝis tre simpla.

Vane la sanktaj viroj rememorigis, ke ili devas nutri reprezentantojn de dek naŭ dinastioj kaj multe da dioj. La trezoristo, divenante la intencojn de l' Faraono, respondis al la pastroj, ke al la dioj kaj antaŭuloj sufiĉos floroj kaj parfumoj, kaj ke la profetoj mem, kiel ordonas la moraleco, devas manĝi hordean panon kaj trinki akvon aŭ bieron. Kiel argumentoj por sia malĝentila teorio la trezoristo citis la ekzemplon de la ĉefpastro Sem, kiu vivis kiel pentofaranto; fine la trezoristo ripetis, ke Lia sankteco kun la generaloj manĝas nur soldatan nutraĵon.

La palacaj pastroj komencis silente konsideri, ĉu ne pli prudente ili agos, se ili forlasos la avaran reĝan domon, kaj transloĝiĝos en la proprajn domojn apud la temploj, kie iliaj devoj estos malpli ŝarĝaj kaj la malsato ne tordos iliajn internaĵojn.

Kaj eble ili senprokraste farus tion, se la plej respektindaj Herhor kaj Mefres ne ordonus al ili resti sur la posteno.

La situacio de Herhor ĉe la nova sinjoro ankaŭ ne povis esti nomata tre feliĉa. La ministro, antaŭ nelonge ĉiopova, kiu iam preskaŭ ne forlasadis la reĝajn ĉambrojn, sidis nun sola en sia palaco kaj ofte dum tutaj dekadoj ne vidis la Faraonon. Li estis ankoraŭ la milita ministro, sed li preskaŭ ĉesis doni la ordonojn. Ĉiujn militajn aferojn la Faraono plenumis mem. Li mem legis la raportojn de l' generaloj, mem solvis neklarajn demandojn, kaj liaj adjutantoj prenis el la milita ministrejo la necesajn dokumentojn.

Lia ekscelenco Herhor estis vokata al la monarĥo preskaŭ nur por ricevi riproĉojn.

Tamen ĉiuj altranguloj devis konfesi, ke la nova Faraono multe laboras.

Ĉiutage Ramzes XIII vekigis antaŭ la leviĝo de l' suno, sin banis kaj bruligis incenson antaŭ la statuo de Oziriso. Tuj poste li aŭskultis la raportojn de la plej alta juĝisto, de la plej alta skribisto de la grenejoj kaj staloj de la tuta lando, fine de la intendanto de siaj palacoj. La lasta plej multe suferis; preskaŭ ne estis tago, en kiu la sinjoro ne diris al li, ke la kortego kostas tro multe kaj estas tro multenombra.

Efektive, en la reĝa palaco loĝis kelkcento da virinoj de la mortinta Faraono kun konvena nombro da infanoj kaj servistoj. La intendanto, senĉese admonata, ĉiutage forpelis dekelkon da personoj kaj limigis la elspezojn al la ceteraj. Post unu monato, ĉiuj kortegaj sinjorinoj kun ploro kaj krio kuris en la loĝejon de la reĝino Nikotris, petegante helpon.

La respektinda reĝino tuj iris al la monarĥo; falinte sur la vizaĝon, ŝi petis, ke li ekkompatu la virinojn de sia patro kaj ne lasu ilin morti de mizero.

La Faraono aŭskultis kun sulkigita frunto kaj ordonis al la intendanto ĉesigi la ŝparadon. Sed samtempe li diris al la plej respektinda sinjorino, ke post la enterigo de l' patro la virinoj estos forigitaj el la palaco kaj dissenditaj en la bienojn.

—Nia kortego —diris li —kostas ĉirkaŭ tridek mil talentojn jare, tio estas duonon pli multe, ol la tuta armeo. Tian sumon mi ne povas elspezi ne ruinigante min kaj la ŝtaton.

—Faru, kiel vi volas —respondis la reĝino. —Egipto estas via. Sed mi timas, ke la dispelitaj korteganoj fariĝos viaj malamikoj.

Aŭdante tion, la sinjoro silente prenis la patrinon je la mano, kondukis ŝin al la fenestro kaj montris arbaron de lancoj de la soldatoj, kiuj ekzerciĝis en la korto.

Ĉi tiu ago de la Faraono havis neatenditan rezulton. En la okuloj de l' reĝino, kiuj antaŭ unu momento estis plenaj de larmoj, ekbrilis fiero. Subite ŝi klinis sin kaj kisis la manon de la filo, parolante per kortuŝita voĉo:

—Vere, vi estas la filo de Izido, kaj mi faris bone, cedante vin al la diino... Egipto fine havas estron!...

De tiu tempo la respektinda sinjorino neniam kaj en neniu afero protektis iun al la filo. Kaj kiam oni petis pri tio, ĉiam ŝi respondis:

—Mi estas servistino de Lia sankteco kaj mi konsilas al vi plenumi sen kontraŭstari la ordonojn de Lia sankteco. Ĉio, kion li faras, venas de la inspiro de l' dioj. Kaj kiu povus kontraŭstari al la dioj?...

Post la matenmanĝo la Faraono sin okupis per la militaj kaj financaj aferoj, kaj je la tria horo posttagmeze, akompanata de granda sekvantaro, li veturis al la armeo, kies tendaro estis apud Memfiso, kaj rigardis la ekzercojn.

Efektive, la plej grandaj ŝanĝoj fariĝis en la militaj aferoj de la ŝtato.

En la daŭro de kvin monatoj Lia sankteco formis du novajn regimentojn, aŭ pli ĝuste revivigis tiujn, kiuj estis nuligitaj dum la antaŭa regado.

Li forigis la oficirojn drinkemajn kaj ludemajn, kaj tiujn, kiuj turmentis la soldatojn.

En la oficejojn de la milita ministrejo, kie antaŭe laboris nur pastroj, li enkondukis siajn plej kapablajn adjutantojn, kiuj baldaŭ prenis en siajn manojn gravajn dokumentojn pri la armeo. Li ordonis fari liston de ĉiuj viroj en la regno, kiuj iam apartenis al la milita klaso, sed de dekelko da jaroj plenumis neniujn oficojn kaj mastrumis en siaj bienoj.

Li fondis du novajn oficirajn lernejojn por infanoj, komencante de dek jaroj, kaj renovigis la antaŭan moron, ke la milita junularo ricevadu la matenmanĝon nur post trihora marŝo, en vicoj kaj kolonoj.

Fine, neniu taĉmento havis la rajton loĝi en kamparoj; ĉiu devis esti en la kazerno aŭ en la tendaro. Ĉiu regimento havis sian placon por la ekzercoj, kie tutan tagon oni uzis ŝtonĵetilojn, aŭ arkpafis al ŝildoj, starigitaj en interspaco de cent ĝis ducent paŝoj.

Estis ankaŭ proklamita ordono al la familioj de la milita klaso, ke la viroj ekzerciĝu en la ĵetado de ŝtonoj, sub la direkto de la oficiroj kaj dekestroj de la regula armeo. Senprokraste oni plenumis la ordonon, kaj Egipto, jam du monatojn post la morto de Ramzes XII, havis aspekton de tendaro.

Eĉ la kamparaj kaj urbaj infanoj, kiuj ĝis nun ludis je skribistoj kaj

pastroj, imitante la plenaĝulojn, komencis ludi je soldatoj. Sur ĉiu placo kaj en ĉiu ĝardeno, de la mateno ĝis la vespero, fajfis ŝtonoj kaj sagoj, kaj la tribunaloj estis supersūtitaĵ per plendoj pri korpaj vundoj.

Aliformita estis Egipto kaj malgraŭ la funebro, regis en ĝi granda movado, kaj ĉio sub la influo de la nova estro.

Kreskis la fiero de la Faraono kaj li estis kontenta, vidante, kiel la tuta ŝtato konformiĝas al lia reĝa volo.

Sed venis momento, kiam eĉ li fariĝis malĝoja.

En la sama tago, kiam la enbalzamigistoj elprenis la korpon de Ramzes XII el la soda bano, la granda trezoristo, prezentante la kutiman raporton, diris al la Faraono:

- Mi ne scias, kion fari... Ni havas en la trezorejo du mil talentojn, kaj por la enterigo de la mortinta sinjoro oni bezonas almenaŭ unu milon...
- Kiel, du miloj?... —ekmiris la estro. —Kiam mi prenis en la manojn la regadon, vi diris; ke ni havas dudek mil...
- Ni elspezis dek ok...
- En du monatoj?...
- Ni havis grandegajn elspezojn...
- Tio estas vera —respondis la Faraono —sed ĉiutage alfluas novaj impostoj...
- La impostoj —respondis la trezoristo —mi ne scias kial, ree malgrandiĝis kaj ne alfluas en tia kvanto, kiel mi kalkulis. Sed ili ankaŭ estas elspezitaj... Via sankteco bonvolu ne forgesi, ke ni havas kvin novajn regimentojn; do ĉirkaŭ ok mil homoj forlasis siajn okupojn kaj vivas je la konto de la ŝtato...

La Faraono ekmeditis.

- Ni devas —diris li —fari novan prunton. Interkonsentu kun Herhor kaj Mefres, por ke la temploj donu al ni monon.
- Mi parolis pri tio. La temploj donos al ni nenion.
- La profetoj ofendiĝis!... —ekridetis la Faraono. —En tia okazo ni devas alvoki la idolanojn... Sendu al mi Dagonon.

Antaŭ la subiro de l' suno venis la fenicia bankiero. Li falis sur la vizaĝon antaŭ la sinjoro kaj donacis al li oran pokalon, inkrustitan per juveloj.

—Nun mi jam povas morti!... —ekkriis Dagon —kiam mia plej favora estro sidiĝis sur la tronon...

—Sed antaŭ kiam vi mortas —diris la Faraono al la genuanta feniciano —penu trovi por mi kelke da miloj da talentoj.

La feniciano rigidiĝis aŭ eble ŝajnis grandan konfuzon.

—Via sankteco prefere ordonu al mi serĉi perlojn en Nilo —respondis li —ĉar mi tuj pereos kaj mia sinjoro ne suspektos min pri malbonaj intencoj... Sed trovi tian sumon hodiaŭ!...

Ramzes XIII ekmiris.

—Kiel? —demandis li —do fenicianoj ne havas plu monon?...

—Sangon kaj vivon nian kaj de niaj infanoj ni donos al via sankteco —respondis Dagon. —Sed monon... Kie ni prenos monon?... Iam la temploj pruntis al ni por dek kvin aŭ dudek procentoj jare. Sed de l' tempo, kiam via sankteco, ankoraŭ kiel kronprinco, estis en la templo de Hator, tie apud Pi-Bast, la pastroj tute rifuzis al ni krediton... Se ili povus, ili hodiaŭ elpelus nin el Egipto, kaj ankoraŭ pli volonte ekstermus... Ha, kion ni suferas dank' al ili... La kamparanoj laboras, kiel ili volas kaj kiam ili volas, kaj kiel imposton ili donas, kio falas de ilia buŝo... Se oni batas iun, li ribelas, kaj kiam malfeliĉa Feniiciano sin turnas al la tribunalo, aŭ li perdas, aŭ devas terure pagi... Niaj horoj sur ĉi tiu tero estas kalkulitaj!... —konkludis Dagon kun larmoj.

La Faraono malĝojiĝis.

—Mi esploros la aferon —respondis li —kaj la tribunaloj estos justaj.

Sed dume mi bezonas kvin mil talentojn...

—Kie ni prenos ilin, sinjoro? —ĝemis Dagon. —Montru al ni via sankteco aĉetantojn, kaj ni vendos la tutan nian havon, por plenumi viajn ordonojn... Sed kie estas la aĉetantoj?... Eble nur la pastroj, kiuj taksos niajn riĉaĵojn je ridinda prezo kaj ne pagos kontante...

—Serĉu en Tiro, Sidono —intermetis la sinjoro. —Ĉiu el ĉi tiuj urboj ja povus prunti al ni ne nur kvin, sed eĉ cent mil talentojn...

—Tiro, Sidono!... —ripetis Dagon. —Hodiaŭ la tuta Fenicio kolektas la oron kaj juvelojn, por page liberigi sin de asirianoj... En nia lando jam vagas senditoj de la reĝo Assar kaj diras, ke se nur ĉiujare ni pagos malavare, la reĝo kaj satrapoj ne nur ne premegos nin, sed eĉ liveros al ni pli grandajn gajnojn, ol tiuj, kiujn ni havas nun dank' al la favoro de via sankteco kaj Egipto...

Daŭrigas en paĝo 16^a



Kajeroj el la Sudo

*Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj*



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels106.pdf>



ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88